

Jozefo Nemeth

El www.edukado.net - Panteono

József NÉMETH naskiĝis la 28-an de aprilo 1960 en Szombathely, li vivas en Hungario. Diplomiĝis kiel bibliotekisto kaj bazlerneja instruisto pri matematiko en 1983. Laboris en la urba biblioteko de Pápa (1983-85), kaj estris la lokan kulturdomon de pedagogoj (1987-89). Ekde 1985 laboras en bazlernejo instruante 10-14-jarajn infanojn. En 1994 sukcese trapasis ekzamenon pri la germana lingvo kaj samjare estis diplomita kiel Esperanto-instruisto en la pedagogia altlernejo de Szombathely. En 2000 diplomiĝis kun laŭdo pri informadiko en la Universitato de Veszprém.



En 2006 en la sama universitato ricevis diplomon kiel fakpedagogo pri pedagogiaj mezurado kaj taksado. Nun laboras kiel instruisto pri informadiko en bazlernejo kaj gimnazio. En 2014 oni elektis lin regiona deputito de Nemzeti Pedagógus Kar (Nacia Korporacio de Pedagogoj) kaj li eniris ankaŭ la prezidantaron de tiu organizaĵo en la departemento Veszprém. En 2016 li ricevis la majstropedagogan titolon.

Esperanton li eklernis en 1979 de Piroska SZABÓ en la Pedagogia Altlernejo de Szombathely, poste instruis lin Balázs WACHA, József FÜLÖP kaj Katalin KOVÁTS. En 1983 li trapasis superan ekzamenon organizitan de Hungara Esperanto Asocio (HEA). En la Altlernejo li reorganizis la Eo-grupon. Dum tiuj jaroj li partoprenis la surbendigadon de la instrumaterialo de B. WACHA. Li partoprenis kaj parte organizis la Junularajn Eo-Renkontiĝojn inter 1979 kaj 1983.

En 1985 li reorganizis la Eo-grupon de la urbo Pápa. En 1996 li kompilis kaj aperigis broŝuron pri la historio de la E-grupo de Pápa (en la sama jaro la grupo ĉesis funkcii). En 1986 li trapasis ŝtatan superan lingvoekzamenon pri E-o, poste en 1991 ankaŭ la mezgradan ILEI/UEA-ekzamenon. Li finis la korespondan Eo-instruistan fakon en Szombathely en la jaro 1994. Lia bazlernejo havis interŝanĝkontakton kun kroataj lernejoj. Pere de tiu kunlaboro li havis/as bonajn kontaktojn kun Spomenka ŠTIMEC, Marija JERKOVIĆ kaj aliaj kroataj esperantistoj. Ili estis en Pápa okfoje, la hungaroj vojaĝis al Kroatio trifoje. Li 6-foje entreprenis la organizadon de la Landa E-Deklamkonkurso. Ĝin ĉiujare partoprenis ĉ. 90 personoj.

Inter 1987 kaj 1989 li funkciigis klubon kun la nomo Világ és Nyelv (Mondo kaj Lingvo), kie prelegis esperantistoj kiel ekzemple PRINCZ Oszkár, d-ro MÁRKUS Gábor, Stefan MACGILL, d-ro NANOVSZKY György, d-ro JÁKI Ferenc, d-ro DENKE Péter Pál kaj Hans-Peter BARTOS.

Krom la organizado li regule aperigis artikolojn en la Eo-gazetaro kaj ankaŭ en la lokaj hungarlingvaj gazetoj. En 1985 kaj 1987 aperis du Eo-libretoj en lia traduko. La unua enhavis fabelojn, poemojn, la dua estas dulingva ŝercaro. Dum kelkaj jaroj li estis la redaktoro de Savaria Eo-Revuo, la organo de la Eo-asocioj de la departementoj Vas kaj Zala. Krome li redaktis ĉ. 20 numerojn de Hungaraj Paĝoj, suplemento de Eventoj por hungaroj (intertempe ambaŭ revuoj ĉesis ekzisti).

Fine de 1994 la tiama redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo (IPR) devis rezigni. Aŭtune de 1994 oni transdonis la redaktajn taskojn al Jozefo NÉMETH kaj ekde tiam li estas redaktoro de IPR. Lian laboron 11 jarojn longe helpis Katalin KOVÁTS, kiel vicredaktoro.

En la jaro 1996 – pro manko de sinanoncantoj – li transprenis ankaŭ la gvidadon de hungara sekcio de ILEI, li sukcesis reordigi ĝian administradon, stabiligi ĝin finance. La membroj de la sekcio formas la kernon de la jure agnoskita hungara asocio EPME (Asocio de Hungaraj Esperantistaj Pedagogoj), kiu en la lastaj 30 jaroj havis averaĝe 48 membrojn. ILEI-HU/EPME ĉiujare klopodas organizi almenaŭ unu komunan konferencon.

En 2006 kaj 2007 la asocio sukcesis ricevi ŝtatan subvencion. Helpe de la subvencio en 2007 la sekciestro kompilis la libreton „Magyar Eszperantó Tanítók Arcképcsarnoka” (Portretaro de Hungaraj Eo-Instruantoj), kiu enhavas informojn, fotojn kaj grandparte ankaŭ biografiojn de 100 aktivaj hungaraj E-instruistoj.

Kune kun Márta KOVÁCS li kompilis aŭdan KD-n kun la prelegoj de István SZERDAHELYI (kun titolo Esperantologiaj fragmentoj), krome li kunlaboris ankaŭ kun edukado.net. En 2004 li helpis la kompiladon de KD enhavanta la tiaman materialon de edukado.net.

Krom la redaktado de IPR li prizorgas ankaŭ la hejmpaĝojn de ILEI (ilei.info) IPR kaj ILEI-HU.

En 1999 li transprenis la redaktadon de Naturista Vivo kaj poste ankaŭ la kasistan funkcion de INOE. En 2001 li iĝis landa reprezentanto de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) kaj en 2008 ĝia vicprezidanto. Ekde 2007 li redaktas la organon Esperantista Vegetarano.

En la jaro 2004 li partoprenis la 37-an ILEI-Konferencon en Bratislava kaj en 2014 la Someran Esperanto-Studadon (kaj la kongreseton de TEVA) en Nitra (Slovakio).

Esperanton li instruis inter 1980 kaj 1995. Komence por plenkreskuloj, poste inter 1985 kaj 1995 ankaŭ por bazlernejoj. Inter 1989 kaj 1994 en lia lernejo ĉ. 70 infanoj lernis Esperanton kiel unuan fremdlingvon. Dum 10 jaroj liaj gelernantoj partoprenis ĉ. 40 landajn konkursojn kaj akiris pli ol dekduon da unuaj lokoj. Poste, pro la malfaciliĝo de cirkonstancoj kaj perdo de motiviĝo li rezignis pri la Eo-instruado en la lernejo. Nuntempe lia Esperanto agado ligiĝas nur al ILEI kaj al la redaktado de Eo-revuoj kaj hejmpaĝoj.